**6**(184)
**2021**

# Apudvistula Bulteno

## de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Mikaelo Bronŝtejn
nia amiko, homo unika, multfaceta: kelklingva aŭtoro de poem-volumoj kaj romanoj, bardo kantanta ĉe gitaro, komponisto, poezia kaj proza tradukanto esperanten el rusa kaj jido, inĝeniero, ĉarma rakontanto de eventoj kaj spritaĵoj, favora kaj amika al ĉiuj estaĵoj, dezirinda en ĉiu societo.

***

Al ĉiuj homoj en la mondo,
kiuj ĉe festa tablo sidas,
deziras mi, ke l' horizonto
vastiĝu pli ol oni vidas,
ke la Kristnasko portu ĝojon,
ke malaperu pandemioj,
ke venu mi por plia foj' en
la mondon al amikoj miaj.

***

Ĉeestas sparkoj de fabel'
en la klopodoj ĉenovjaraj.
Mi partoprenas, miaj karaj,
en tiu ĉarma bruo de l'
foiroj, vago en butikoj –
dum daŭre sanas geamikoj
dum neĝon ŝutas la ĉiel',
dum restas em' el mia kel'
vespere preni polvan vitron -
diboĉdeziron kaj malvirton,
kaŝantan sin en la botel'.

Ekŝaŭmu vino en kalikoj,
kaj tostu kune ni amikoj,
por paco en la monda hel',
kaj trinku ĝoje kaj ĝisfunde,
kaj gvidu nin la stelo nun de
la gaja fest' al glora cel'!



***

Pasintnovjaraj abioj forbrulis
en la stampedo de l' tempa rutin'.
Dekdu monatojn horloĝ' forkalkulis
kaj altiktakis al nova jarfin'.

Kaj renaskiĝas fenikse en stratoj
odoro tenta de la konifer',
kaj festaj datoj, jam tre atendataj,
triumfe paŝas de nun laŭ la Ter'.

Do en la neĝa rusia provinco
mi ŝaltu lumojn sur mia abi' –
kaj ekvidos, ke brilas trans l' vintro
la bondeziroj plej koraj por vi.

***

Rapidas jar' al fino
kaj, kvazaŭ celkonscie,
botelo da ŝaŭmvino
ripozas englacie.

En spiron tiklas tente
fluidoj koniferaj,
fabeloj pormomente
ekvivas kvazaŭ veraj.

Tra l' tuta homa gento
ekregas vivavido,
kaj cedas nun prudento
al rido kaj senbrido,

kaj vortojn bondezirajn
mi nun rapidas formi
por ke vi reciproke
deziru ion por mi.

Stanisław Lem

# Ni savu Universon
## (Letero aperta de Ijon Tichy)

Post la pli longa restado sur la Tero mi preparis sin al forvojaĝo por viziti la plej ŝatatajn lokojn de miaj eksaj ekspedicioj – arojn globajn de Perseo, konstelacion de Bovido kaj grandan nubon stelan ĉe centro de Galaksio. Ĉie mi trovis ŝanĝojn, pri kiuj peze al mi skribi, ĉar ili ne estas ŝanĝoj al pli bone. Oni diras nun multe pri popularigo de la kosma turismo. Sendube turismo estas la perfekta aĵo, sed ĉio devas havi sian skalon.

Malordoj komenciĝas jam post la sojlo. [...] Precipe ŝatata de flirtantaj paretoj Eroso skuas pro batoj, per kiuj diversaj hejmkaligrafoj forĝas en ĝia krusto memorskribaĵojn. Kelkaj aranĝemaj spirituloj pruntedonas surloke martelojn, ĉizilojn, kaj eĉ pneŭmatikaj boriloj kaj homo ne povas trovi virgan rokon en la plej sovaĝa iame solejo.

De ĉie timigas surskriboj similaj al tiuj: "Mi amas vin ciklone sur ĉi meteorŝtono", aŭ "Sub ĉi asteroida roko nia amo daŭras reciproke" kaj tiel plu – kune kun koroj trapikitaj per sago laŭ la plej malbona gusto. [...]

Profesoro Bruckee de observatorio plendis al mi antaŭ nelonge pro pli febla brilo de ambaŭ steloj de Centaŭro. Kiel ili ne plimalfortiĝu, se la tuta ĉirkaŭaĵo plenigita estas per malpuraĵoj?!

Ĉirkaŭ peza planedo de Siriuso fariĝis ringo rememoranta ringojn de Saturno, sed konstruita el boteloj post biero kaj limonado. Kosmonaŭto fluganta tra ĉi tiu trako devas preterveturi ne nur nubojn de meteoritoj, sed ankaŭ skatolojn post konservaĵoj, ovajn ŝelojn kaj malnovajn gazetojn. [...] Ju pli alta en galaksio civilizo, des pli oni tie produktas balaaĵojn ka malpuraĵojn. [...]

La sanitaraj kondiĉoj, precipe sur planedoj apartenantaj al la Granda Rezervejo, krias je venĝo al la ĉielo. En "Voĉo de Mersiturio" mi legis artikolon, kies aŭtoro postulas totalan ekstermadon de tiaj superbaj bestoj, kiaj estas *insiduloj englutivaj*. Rabemuloj tiuj posedas sur la supra lipo vicon de lumantaj verukoj, metiĝantaj en diversajn desegnaĵoj. Vere – dum la lastaj jaroj pli kaj pli ofte aperas specio, ĉe kiu verukoj formiĝas en du nulojn. Insiduloj elektas kutime proksimon de tendaroj kaj bivakejoj, kie nokte, en malhelo, atendas kun larĝe aperta faŭko personojn serĉantajn izolitan lokon. Ĉu aŭtoro de artikolo ne komprenas, ke bestoj estas entute malkulpaj kaj anstataŭ ili oni povas akuzi faktorojn respondecajn pri manko de ĝustaj sanitaraj instaloj?!

Sur la sama Mersiturio manko de plifaciligoj municipaj provokis tutan serion de genetikaj mutacioj ĉe insektoj.

En lokoj famaj de belaj pejzaĝoj – neunufoje oni povas rimarki oportunajn plektitajn el saliko foteletojn, kiuj ŝajne invitas lacan piediranton. Se li senpripense deŝoviĝos inter logantajn apogilojn – ili ĵetiĝas sur li, kaj ŝajna meblo montriĝas kiel miloj da diverskolore makulitaj formikoj (formiko *seĝulino turmentpuga,* multipodium pseudostellatum Trylopii), kiuj starante ĝuste sur si imitas plektitan salikon. [...]

Universo ne estas la infanĝardeno kaj natura evoluo – idilio. Oni devas eldoni broŝurojn similajn al tiuj, kiujn mi vidis sur Derdimono, en kiuj oni avertas botanikistojn-amatorojn antaŭ *kruelulino bizareska* (pliximiglaquia bombardans L.). Ĝi floras per superbaj floroj, sed oni devas kontraŭstari al emo forŝiri ilin, ĉar kruelulino vivas en kompakta simbiozo kun *frakasulino ŝtonabla*, arbo naskanta fruktojn je grandeco de kukurbo, sed kornhavajn. Sufiĉas ŝiri unu floreton, por sur la kapon de nesingarda kolektanto falus hajlo de malmolaj kiel ŝtonoj kugloj. Kruelulino kaj frakasulino faras poste al la mortinto nenion malbonan, ĉar ili kontentiĝas pro naturaj efikoj de ĉi tiu mortigo kontribuanta al fekundigo de grundo en ilia proksimo.

Strangaĵojn de minikro oni renkontas cetere sur ĉiuj planedoj de Rezervejo. Tiel ekzemple savanoj de Belurio ĉielarkas per diverskoloraj floroj, inter kiuj distingiĝas pro eksterordinara belo kaj aromo punca rozo (rosa mendatrix Tichiana kiel volois ĝin nomi profesoro Pingle, ĉar mi la unua ĝin priskribis). La ŝajna floro vere estas surkreskaĵo sur vosto de *vergkaptulo* – rabobesto beluria. Malsata vergkaptulo kaŝas sin en densaĵo disvolvinte antaŭen sian ege longan voston, tiel, por nur floro elstaru el herbo. Suspektante nenion, turisto aliras por ĝin ekflari, kaj tiam la monstro saltas sur li de malanta-

ŭo. Ĝi havas kojndentojn preskaŭ tiel longajn kiel elefantajn. Jen kiel strangege veriĝas kosma varianto de la diraĵo, ke ne ekzistas rozo sen dornoj. [...]

Laŭnature mi estas optimisto kaj penas laŭ la fortoj konservi bonan opinion pri la homo, sed vere ne ĉiam tio eblas. Sur Protostenezo vivas malgranda birdeto, simila al tera papago, ne parolaĉas ĝi tamen, sed skribas. La plej ofte, bedaŭrinde, surskribas ĝi sur bariloj maldecajn vortojn, kiujn instruas ĝin teraj turistoj. Birdeton tiun certaj homoj alkondukas al kolerego kritikante ĝiajn ortografiajn erarojn. Ĝi tiam komencas formanĝi pro la furiozo ĉion, kion ekvidos. Ili alŝovadas al ĝi sub la bekon zingibron, rozenojn, pipron. [...] Kiam la birdeto mortas pro tromaĝado, ili prenas ĝin sur rostostangon. Ĝi nomiĝas *skribaĉeto mokimituleto* (graphomanus spasmatikus Essebachii). Al ĉi tiu rara specio minacas nun pereo, ĉar ĉiu turisto venanta sur Protostenezon avidas frandaĵon – skribaĉetojn rostitajn en deliro. [...]

Kaj denove certaj personoj opinias, ke se ni formanĝadas kreaĵojn el aliaj planedoj, ĉio estas en ordo, se male okazas inverse, ili kriaĉas, vokas helpon, postulas punekspediciojn ktp. Sed ja ĉiaj akuzoj de kosmaj faŭno kaj flaŭro pri perverseco kaj ruzaj emoj estas antropomorfiga sensencaĵo.

Se *erarigulo fripona*, kiu aspektas kiel putrita arbostumpo, ekstaras en la ĝusta pozo sur malantaŭaj piedoj kaj imitas vojmontrilon ĉe montara trako, elkondukas preterirantojn al senvojoj, kaj kiam ili falos en abismon, ĝi descendas malsupren, por eknutri sin, se, mi diras, ĝi tion faras, do nur tial ke ordigaj servoj ne zorgas en Rezervejo pri vojaj signoj, el kiuj detavoliĝas farbo, pro kio ili putriĝas kaj fariĝas similaj al ĉi tiu besto. Ĉiu alia sur ĝia loko farus la samon.[...]

Se temas pri *fetorulino abomeniga* de Stredogencio mi konsentas, ke odoro, kian ĝi emanas estas nekomparebla kun aliaj. Doktoro Hopkins el universitato en Milwaukee prikalkulis, ke precipe energiaj specimenoj scipovas produkti ĝis kvin milojn da stinkeroj (unuo odora) dum sekundo. Sed eĉ malgranda infano scias, ke fetorulino kondutas ĉi maniere nur tiam, kiam oni ĝin fotas.

Vido de ekcelita fotoaparato igas reflekson lensan-subvostan, per kiu Naturo strebas defendi ĉi tiun malkulpan kreaĵeton antaŭ trudemo de gapuloj. Vere, ke fetorulino estante iom miopa, traktas fojfoje kiel fotoaparaton objektojn tiajn kiel cigaredujo, fajrilo, horloĝo, kaj eĉ ordenoj kaj distingiloj, sed ankaŭ parte tial, ke certaj turistoj uzas aparatojn miniaturigitajn, kaj tiam facile estas erariĝi. Se temas pri rimarko, ke fetorulino dum lastaj jaroj pligrandiĝis sian atingo-distancon kaj produktas ĝis ok megastinkerojn por hektaro, oni devas klarigi, ke tio estas kaŭzita pro multnombra uzado de teleobjektivoj.

Mi ne volus krei impreson, ke mi opinias ĉiujn bestojn kaj vegetalojn kosmajn – ne tuŝeblajn. Sed por multaj malprofitaj kosmaj ŝanĝoj respondecas tamen la homo. [...] Malaperis jam el surfaco de planedoj tiaj specioj kiel *senordulo blua* aŭ *transpikpugulo obstina*. Pereas miloj da aliaj. Pro nuboj de balaaĵoj pligrandiĝas makuloj sur la Suno.

Mi memoras ankoraŭ tempon, kiam la plej granda premio por infano estis promeso de la dimanĉa ekskurso sur Marson, kaj nun kapricana etulo ne matenmanĝos, se la patro ne igos por li specialan eksplodon de stelo Supernova. Disipante por tiaj kapricoj la kosman energion, malpurigante meteoritojn kaj planedojn, malplenigante trezoron de Rezervejo, kun ĉiu paŝo postrestante en galaksiaj spacoj krustojn, fruktostumpojn, paperojn, ni ruinigas Universon, ŝanĝas ĝin en unu grandan ujon kun forfalaĵoj. La plej ĝusta tempo resobriĝi kaj komenci ekzekvi devigajn regulojn. Kun konvinko, ke minaca estas ĉiu momento de prokrasto, mi batas je alarmo alvokante savi la Universon.

tradukis *Lidia Ligęza*

La jaro 2021 estas inter alie dediĉita al eminenta pola fantazi-verkisto Stanisław Lem, okaze de lia 100-a naskiĝdatreveno. Pro liaj verkoj fieras ankaŭ Krakovo, loko de multjara lia loĝado.

Esperantistoj multe kontribuis al ĉi tiu dato. Przemysław Wierzbowski de Bjalistoko tradukis unu el plej konataj romanoj de Lem "Solaris", kiu aperis antaŭ nelonge kun kovrilo de la tradukanto.

Lidia Ligęza tradukis rakontojn "Invado el Aldebarano" kaj "Ni savu Universon".

*Red. AB*

Por la Nova Jaro 2022 ni bondeziras al niaj anoj kaj legantoj laŭ XIX-jarcenta kantaĵo de kantikantoj vizitantaj dum kristnaska tempo-periodo gemastrojn en la montara vilaĝo Ŝĉavnica:

Estu laŭdata Jesuo Kristo!
Nova Jaro jam maldistra:
Dum ĝi vi havu pizon kaj tritikon
Kaj sabate amuzu ĉe vigla muziko.
Vi havu plenajn kamerojn kaj kelojn
Kaj bongustan vodketon en ĉiun bareloj.
Vi havu feliĉon, sanon kaj plezuron
Kaj esperon ĝisvivi la jaron futuran
Kun malpli grandaj pekoj
Kaj pli granda ĝuo,
Kun kotletoj, bifstekoj,
Al am' kontribuo.
Se vi al ni donos bonan flanon
Jesuo premios honestan kristanon!

## Bonan apetiton

Dum malnovpolaj publikaj kaj privataj kunvenoj ĉiam okazadis pompaj bankedoj. Okaze la Nova Jaro ankaŭ, memkompreneble en bonhavaj medioj.

Laŭ observoj de eksterlandanoj poloj ne distingiĝis per modero; "unu polo manĝas tiom, kion kvin italoj" raportas la itala vojaĝanto. Oni servis porkaĵon, kokinaĵon, ŝafaĵon kun salato kaj kukumoj, rostaĵojn el uro aŭ bovo, strangaĵojn kiel ursajn piedojn, kastorajn vostojn aŭ naztruojn de alko. Precipe ŝatataj estis kapreolina kolbaso kaj fiŝo en saŭco. Saŭcoj estis diversaj, ĉiam grasaj kaj densaj kun multe da spicaĵoj. Flavan saŭcon oni faris el safrano, ruĝan el ĉeriza suko, nigran el pruna marmelado, grizan el raspita cepo. Ilin oni aldonadis al ĉio. Malpli riĉaj konsumantoj kontentigis per acida brasiko kun fumaĵita lardo, hordea grio, ravioloj, farunbuloj kun kazeo. Kiel deserton en ĉiuj medioj oni manĝis kazeon, kremon, fruktojn, sukeraĵojn kaj absolute nekompreneble por nepoloj – pizon pistitan kun lardo, sen kiu ne ekzistis la konvena regalo. Kuirmaniero riĉa en diversaj spicaĵoj kaj preskaŭ senigita tre multekostan sukeron transdaŭris almenaŭ du jarcentojn.



## Proverboj por la Nova Jaro

Januaro – dezir-tempo por la jaro,
do ni bondeziras Di-benon kaj sanon,
bonajn gastojn, prosperon kaj panon.

De Nova Jaro
tagoj pli longaj je salt' de ŝafaro.

Kion Nova Jaro ordonos,
tion aŭgusto montros.

Per kiu veter' Novjaro disponas,
tian aŭguste Sinjor' Dio donas.

Kiam novjare malseke kaj aĉe,
rikolto certe estos malplaĉa.

Kiam nebulo en Novjaro,
bone manĝos nur vermaro.

Se Nova Jaro ruĝ-aŭroron portas,
oftaj estos pluvo kaj ventego forta.

Se novjara tago belvetera,
en garbejo mankos lok' libera.

Se Novjaro hela kaj bela,
plene estos en kamero kaj kelo.

Se dum Novjaro neĝos,
vi manĝos kiel reĝo.

Nova Jaro, nova espero,
sed postrestas malnova mizero.

En Novjaro, en ĥato propra
ĉiu kampulo etas sobra.

Nova Jaro venas,
al bonuloj benas.